malordo en la funkciado. Ekzemple:
-> perturbita televida ricevado* *ontvangst* /elsendo*; *uitzending*
-> kaŭzo de perturbita digestado.
3) Ĉu vi **deĵoras*** ĉiutage? *dienst hebben*
Nur ĉiun trian tagon !?
Je kioma horo **komenciĝas** via deĵoro?
4) **ŝriki** = eligi* akutan krion. *uitstoten*
Kiam oni ne (plu) kapablas eligi* *uiten* aŭ eĉ **ŝriki** ian* vorton? *een of ander (soort)*
okaze de granda surprizo, timo, emocio...
Kp. alian vorton kun ŝr- : Meti la manĝilaron^ en la ŝrankon*. *eetgerei, kast*
5) Kio estus la rolo de la **inkomakulo**?
Laŭdire^ ties* formo *naar men zegt, daarvan* povus informi pri ies* karaktero, *iemands* pri iu **okaz(int)aĵo*** aŭ okazontaĵo. *gebeurtenis*

6) Zamenhof pri 'makulo':
Konscienco senmakula estas kuseno plej mola =?
ni povas dormi pace* sen timi, *in vrede*
ke riproĉoj de la konscienco vekos nin.
Neniu sanktulo* estas sen... *heilige*
makulo. =?
Eĉ sanktulo povas havi malbela(j)n....
karaktertrajto(j)n* ! *karaktertrek*
Se kalumnio* ne ... *laster*
brulas, ĝi almenaŭ makulas*. *bevlekken*
La perfekteco*... ne ekzistas. *volmaaktheid*

2) GRAMATIKO

1) **Kia/kiel**. La sorĉistinoj estis (for)**bruligitaj vivaj**. Notu la demandojn: Kiaj ili estis forbruligitaj? (vivaj); Kiel ili estis forbruligitaj? (publike, per la fajro).

2) Ŝi **prezentis la poemon anonim/a/e/an**=?
a) prezenti la **poemon anonima** = tia(maniere), ke ĝi estas aŭ restas anonima. Ŝi ne volas influi la opinion de aliuloj menciante la nomon de la aŭtoro.
b) **anonime**: tiu, kiu prezentis la poemon faris tion sen mencii sian nomon.
c) **anoniman**: la poemo estas anonima poemo.

3) kp. **li prezentis al si la aferon tre facil/a/e/an.**
a) Facila: li prezentis al si (li pensis), **ke** la afero estas facila .
b) Facile: li faris tion sen ia ajn malfacileco, en ia ajn speciala klopodo.
c) Facilan = la tre facilan aferon (ne tre kutima vortordo).


3) Tradukekzerco el la antaŭa numero.

1) Gloro (famo) estas la soifo de la junularo (Byron). 2) Niaj filozofoj, kiuj skribas librojn pri la mal-estimindeco de la gloro/famo, tamen mencias sian nomon sur la titolpaĝo (Cicerono). 3) Gloro (famo) estas la pruvo ke la homaro estas trokredema (R. W. Emerson). 4) Kio estas famo (gloro)? Fari ke multaj stultaĵoj estu diritaj (dirataj) pri si (G. Flaubert). 5) La solaj, kiuj meritas statuon estas tiuj, kiuj ne bezonas iun (Hazlitt). 6) La gloro (famo) kiun vi akiras neniam respondas al la peno, kiun vi trudis al vi mem (Horacio). 7) Se (la) gloro venas nur post-morte, mi volonte ankoraŭ (plu) atendos ĝin (Marcialo). 8) Kiu havas por sin glori nenion alian (pro/pri kio sin glori) ol siajn famajn prapatrojn similas al terpomplanto: la sola bono, kiun ĝi havas estas/sidas sub la tero/ grundo. (Thomas Overbury). 9) Ĉu vi volas ke oni laŭdu (gloru) vin? Tiam ne faru tion (vi) mem! (Blaise Pascal). 10) La honoro kaj la vivo rolas same: se oni ilin perdas, tio validas por ĉiam (Nicolas Pavillon). 11) La lasta honoro kiun oni faras al mortintoj estas kelkfoje la unua. (E. Wertheimer). 12) Mi preferus ke oni sin demandus kial honore al mi oni ne estis stariginta statuon ol kial jes (Katono la Maljuna).

4) Tradukekzerco

1) De beste leraar is hij, die het meest van zijn leerlingen opsteekt (Jean de Boisson).
2) Cultuur is wat overblijft, wanneer men alles vergeten heeft wat men geleerd heeft (Selma Lagerlof).
3) Natuur: Het maakt alle verschil of je een insekt in de slaapkamer hoort of in de tuin. (Robert Lynd).
4) Verklarende aantekeningen bij een gedicht zijn als anatomische voordrachten bij een lekker gebraad (Schlegel).
5) Ouders die merken dat hun zoon het beroep van dichter wil kiezen, moeten hem zo lang afranselen, tot hij het verzenmaken opgeeft of tot hij een groot dichter wordt (G. C. Lichtenberg).
6) Daar men niet zo universeel kan zijn dat men alles weet wat van alles te weten is, moet men weinig weten van alles. Want het is veel mooier iets van alles te weten dan alles van één enkel ding (Blaise Pascal).


Vragen en/of opmerkingen rechtstreeks aan de redacteur sturen:
Emiel Van Damme, Albert I-straat 44,
B-1703 Schepdaal
(em.vandamme@skynet.be).



La unua eldono de la germana "Bildvortaro Duden" aperis en la jaro 1936. Estis tutmonde la unua ampleksa tiaspeca verko. De postaj eldonoj eldoniĝis tradukoj en dekoj da lingvoj, inter kiuj angla, araba, ĉina, japana, sveda ktp. Bazo de nia traduko estas la 6-a eldono (2005)... kaj nia esperanta versio estas la unua alilingva de ĝi. Ĉiu posta eldono respegulis la evoluon de teĥniko kaj socio en la intertempa jardeko. Firmecon apartan por Esperantistoj nia libro ĉerpas el sia ligiteco kun PIV, kun kiu ĝi vivas ne kiel hundo kun kato, sed kontraŭe kiel apoganta kaj fidela parenco. La antaŭa "Esperanta Bildvortaro" baziĝis sur la dua eldono el 1958.

Aspekto.

La formato de "Bildvortaro" estas kiel PIV, krom ke ĝi estas 2,5 cm malpli alta. Bindo estas klasika kaj altnivela. Kovrilo estas dura, blua. Sur la kovrilo kaj spino estas, modeste, la titolo "Bildvortaro" kun aldone pli malgrandlitere: "en Esperanto". Sur la interna frontpaĝo la mencio "en Esperanto" ne estas. Estis amikino Gerd, kiu konvinkis min ke estas utile, eble eĉ necese, aldoni tiun mencion sur la kovrilo... kaj... ŝi (kiel kutime) pravas.



Enhavo.

Entute estas 415 tabuloj, aŭ fakte 488, ĉar foje estas du tabuloj kun sama numero, por unu temo. La temoj grupiĝas en 11 kampoj. La bildoj, pro kompreneblaj kialoj, estas nigre-blankaj, sed tamen, fine de la libro troviĝas 22 koloraj tabuloj. Ĉe la responda nigre-blanka tabulo estas referenco al la kolora, kompreneble. Mi nun iomete priskribos la diversajn kampojn.

Atomo, Universo, Tero:

ampleksas 18 tabulojn. Temas pri atommodeloj, ĝenerala geografio, inkluzive vulkanismon, meteologio (i.a. specoj de nuboj) kaj ĝiaj instrumentoj, kaj mapoj. Eĉ la spacoteleskopo konigos al vi la nomojn de siaj plej gravaj partoj, kaj kelkaj observatorioj sin priskribas. Tamen ne esperu trovi en ĝi la bildon de la Higgs-partiklo!

Homo kaj Hejmo:

listigas en 40 tabuloj la nomojn de la plej ĉiutagaj kaj plej homproksimaj aĵoj. Se tiaj listoj ne lasos vin buŝmalfermitaj pro miro.... tamen estus instrue se vi foje klopodus ekde la bildoj mem starigi tiajn listojn! Mi foje rigardu tabulon 48an: Kuirejaj aparatoj. Risorta tortoformo: nenio speciala, tute klara? Kaj la vortaro lasas al vi elekton, ĉar estas alia propono por la sama afero: kukmuldilo kun demetebla rando. "Karulo, donu al mi la kukmuldilon! Kian? Nu, tiun kun la demetebla (forprenebla) rando!" Ankaŭ gravaj partoj de aparatoj havas nomon: tranĉodiskoj de viandomuelilo, kaj la spagetujo kun interna retpoto. En tiu serio, kompreneble, estas ankaŭ la diversaj tavoloj de homa korpo, kun ĝiaj foje interŝanĝeblaj organoj. La anatomio de la homo ne kunpremiĝis en unu tabulon, sed ĝi ampleksas sep tabulojn. Kaj la feto ne plu estas tabua, sed serioze traktiĝas. Mi tamen enmetis referencon al PIV, ĉar tie estas, malgraŭ sia malgrandeco, bildo, kiu liveras kelkajn pliajn nomojn de nocioj. Tiel ankaŭ ĉe la tabulo de spirorganoj kaj sangofluo mi referencis al PIV, pere de la vorto vojo, ĉar en PIV la interesa

ilustraĵo troviĝas... jes, tie! Ĉu vi povis diveni? La serio ankaŭ faras rondiron en ĉiuj eblaj ĉambretoj de via hejmo. La lasta tabulo en la serio instruas al vi nomojn por dekoj da ŝuoj.

Ŝtato kaj Urbo:

per 26 tabuloj ni kondukas vin en vian ĉirkaŭan mondon. Necesas mono por eniri la mondon. Ĉu ne jam Zamenhof instruis al ni ke "Amo estas forta, sed mono pli forta"? Eĉ la sekretoj de la eŭrobiletoj estas klare montritaj kaj nomitaj en unu el la bildoj kaj tiel vi estos armitaj por arta reprodukto de la biletoj, se vi ŝatas tion. Ŝtato signifas armeo, polico, elektoj, sed ankaŭ instruado, horekao (hoteloj, restoracioj, kafejoj), magazenoj, parkoj. Ne estas forgesita eĉ la rubaĵotraktado.



Sporto, ludoj, libertempo:

en 39 tabuloj estas prezentitaj plej diversaj sportoj ĝis inkluzive la rultabulado. La plej diversaj pozoj kaj ekzercoj de gimnastiko ampleksas tri tabulojn, kies terminoj kaj esprimoj certe ne estas facile troveblaj en aliaj vortaroj. Ĉu vi povas imagi kio estas kaj kiel distingiĝas ŝveba streĉgamba sido kaj ŝveba disgamba sido? Verŝajne jes... sed ĉu vi mem rapide trovus taŭgan nomon por la pozoj?

Distriĝo, arto kaj kulturo:

estas tria kampo, laŭ amplekso, per 51 tabuloj. Temas pri kermeso, nokta amuzejo, filmo, muziko, religio, arto, sed ankaŭ matematiko, fiziko kaj ĥemio. Forigita estas la tabulo de la grekaj kaj romaniaj dioj kaj diinoj..., kiujn vi do devos konsulti en la malnova bildvortaro. Ankaŭ multaj terminoj rilate taŭrobatalo, toreado, rodeo distros vin.

Animaloj kaj plantoj:

estas relative modesta kampo en la libro, per 27 tabuloj. Sed, se vi konas la nomojn de ĉiuj bestoj kaj plantoj en la libro, kaj ankaŭ vere rekonas ilin en vereco, tiam vi certe ne estas naturanalfabeto! Iam montriĝis en mia kutima fiŝvendejo belega granda afiŝo, montrotabulo, kun pli ol 150 diversaj specioj de salikokoj, kaj ĉiu montris sian veran propran nomon. Intertempe mi scias (ĉu ankaŭ vi?) ke la du plej ofte manĝataj specioj ĉe ni: la grizaj salikokoj kaj la rozaj salikokoj (ĉu klare, ĉu ne?) fakte nomiĝas krangono kaj leandro... sed mi timas ke mi sonus tro pedanta se mi fanfaronus pri tia scio, kaj rifuzus manĝi grizajn salikokojn! De la grandaj, gigantaj, salikokoj mi ĝis nun ne konas la veran nomon; mi provizore kontentiĝas per salikokegoj kaj omaretoj, aŭ foje kankr(et)oj... La bildvortaro iel sugestas, tamen tre hezite, pasifeoj (en la tabulo pri profundmaraj estaĵoj), sed plie konas nur la salikokojn.

Naturo, agrikulturo kaj arbarkulturo:

ampleksas 42 tabulojn. Kompreneble ankaŭ en tiu serio aperas multe da plantoj, multe da bestoj. La tabulo pri legomoj, kiu unuavide ŝajnas esti sama kiel tiu de antaŭa eldono, tamen enhavas unu plian legomon, nome erukon. Kompreneble ekzistas multe pli ol 44 legomoj. Tial mi aldone listigis apude dekojn da nomoj de aliaj (ne ĉiam nepre ekzotaj) legomoj, kies nomo, priskribo kaj difino aperas en nia neniam sufiĉe laŭdota PIV-o.

Metioj:

estas, per 81 tabuloj, la plej vasta kampo en la Bildvortaro. Estas logike, ĉar la nombro de metioj, se ne senfina (ĉu vere?) tamen estas treege vasta. Ekde plej historiaj, plej bazaj kiel bierfaristo, muelisto, bakisto, ŝuisto, tajloro (eĉ se ne plu surbaze de bestofeloj) la libro pritraktas la ejojn, ilojn, istojn de la modernaj metioj en fakoj kiel nuklea energio kaj renovigebla energio. La partojn de ventoturbino kaj de sunĉela elektrejo vi povos senhezite provizi de nometikedon post konsulto de la nova Bildvortaro... se vi deziras. Ke la libro ankoraŭ ne sufiĉe senprudiĝis (deprudiĝis?), kaj lasas nepritraktita la plej malnovan metion, verŝajne ne ŝokos vin. Cetere, tiele jam estas pretigita temo por sekvonta eldono, kaj por la esperantaj tradukontoj la terminoj jam estas preparitaj en la naŭa "Aldono de la Akademio"!

Grafiko:

estas traktita, en 13 tabuloj, kiel aparta fako, kvankam ĝi jam okupas tabulon en la kampo de Arto. Kaj prave, ĉar se grafiko estas tute prozaeca okupo (metio), ĝi tamen havas ankaŭ apartan fakeron, nome la artan grafikon. Jes, ne estas tiel facile ĝuste limigi faketojn por priskribi la homan okupadon! La nova Bildvortaro sekvis la evoluon (ne nur en tiu ĉi fako) kaj pritraktas la ciferecajn amaskomunikilojn, en du tabuloj, kaj konas analogan-al-ciferecan konvertilojn.

Trafiko:

estas la kanceraĵo de nia moderna mondo, kaj ampleksas 69 tabulojn. Ne jam malaperis la biciklo, kaj vi povos lerni eĉ nomi ĉiujn partojn de bicikla pedalo... sed vi ankaŭ povas tuj okulumi la imponajn tabulojn pri spacveturado kaj pri la surluniĝo. Komprenebie estas novaj tabuloj, ĉar ĉe la apero de la unua Esperanta Bildvortaro ne jam estis serioza konsidero pri la ebleco de iama surluniĝo, aŭ ĉu mi eraras? Vi, kompreneble, ankaŭ povos kontentiĝi per studado de rivertrafiko aŭ trajnado!


Banko:


estas la titolo de la lasta kampo en la libro. En 8 tabuloj montriĝas multe da terminoj rilate bankojn, sed ne nur rilate bankojn, ĉar la unuaj tabuloj nepre validas por ĉiu ajn oficejo. Nomojn de kontoraj necesaĵoj vi trovos do en tiu ĉi parto. Tabla vinktilo kun sia turnebla vinktomatrico kaj vinktujo kun ŝovŝargilo (tre logikaj nomoj, ĉu? ... sed?...) aperas tie... kaj ili certe ne nur en bankoj estas uzataj.


Ne vortoj sed faktoj.

Kun tre feliĉa, eĉ jubila, sento mi povas ankaŭ aldoni ke nia esperanta bildvortaro estas pli altkvalite eldonita ol la originala germana! La germana eldono estas, laŭ la moderna maniero, gluita, konsistas el amaso da kungluitaj paĝoj. Mi povas konfesi al vi ke mia ekzemplero, kaj tiuj de la kunlaborantoj, jam ne plu estas tute kungluitaj! Nia esperanta eldono estas tute tradicie zorge bindita, kun tolspina protekto, kaj tradiciaj kajeroj. La pola firmao Skonpres liveris modelan produkton, almenaŭ laŭ mia propra konvinko. Ĉu la libro ne havas mankojn? Nu, nepre jes, sed mi ne pensas ke estas mia rolo kaj tasko publike pritrakti ilin.

Petro De Smedt







Prof moet examen Engels afleggen

Een nieuw decreet legt eisen op voor docenten die lesgeven in een vreemde taal. Zij moeten een niveau C1 halen, het niveau taalleerkracht secundair, bijna native speaker. Een docent die een diploma behaald heeft in de taal waarin hij doceert, is vrijgesteld. (www.standaard.be, 16.10.2012)

no Vlamisch

"Ik ging zelf op de werf kijken. Zo konden problemen makkelijker opgelost worden. Maar nu is de communicatie met de mensen op de werf niet meer zo simpel. Soms geef je veel uitleg en krijg je het korte antwoord: no Vlamisch." (Maurice Decoster, met pensioen gaand werknemer van ingenieursbedrijf Ingenium, Brugsch Handelsblad, 2.11.2012)

HopiTAAL

Brusselse artsen en verpleegkundigen kunnen online hun Nederlands (vooral medische terminologie) oefenen met het programma HopiTAAL, dat speciaal voor de Brusselse ziekenhuizen ontwikkeld werd. (Brussel deze week, 15.11.2012)

Nieuwe Latijnse academie

(Belga) Om de opening van een nieuwe Latijnse academie extra in de verf te zetten, heeft de Italiaanse kardinaal Gianfranco Ravasi een tweet in het Latijn verstuurd. "Hodie una cum Ivano Dionigi novam aperiemus academiam pontificiam latinitatis a Benedicto conditam, hora XVII, via Conciliationis V", kondigde de tweetende kardinaal aan via de sociale netwerksite. De vertaling luidt (bij benadering) als volgt: "Vandaag zullen we, samen met Ivano Dionigi, op de Via Della Colciliazione 5 rond 17 uur de nieuwe pauselijke academie openen op verzoek van Benedictus XVI." (Belga, 21.11.2012)

Nieuw ERK?

Is het tijd voor een nieuw gemeenschappelijk Europees referentiekader voor talen (ERK)? Deze vraag stellen de organisatoren van de tweede editie van de 'International Conference on Language Testing', die van maandag 27 mei tot woensdag 29 mei 2013 in Antwerpen plaatsvindt.

Esperanto

Tatoeba: 200.000 zinnen

Tatoeba is een verzameling zinnen in meerdere talen. Op 1 november 2012 haalde Tatoeba de kaap van 200.000 Esperantozinnen. Esperanto levert daarmee, na het Engels, de belangrijkste bijdrage aan het project. Op het vlak van gesproken zinnen is de Esperantobijdrage bescheidener: de tiende plaats met 500 zinnen. (groups.yahoo.com/group/esper-german, www.tatoeba.org)

Grafikilo

Grafikilo 12 is een gratis grafisch programma, gebaseerd op de Java-programmeertaal, met handleiding in het Engels en het Esperanto. Het is vooral geschikt om aanvullende informatie (tekstballonnen...) aan te brengen op bestaande afbeeldingen en kaarten.
(purl.oclc.org/net/klivo/grafikilo12)

La Ponto

De Limburgse Esperantovereniging publiceert haar tijdschrift La Ponto al enkele jaren digitaal. De volledige collectie staat op esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html

Reisinformatie

www.vojagxo.info is een nieuwe site waar alle mogelijke reisinformatie verzameld wordt in het Esperanto. Het is een Russisch initiatief en de klemtoon ligt dan ook eerder (maar zeker niet alleen) op deze regio.

Zoekertjes

Op per.esocom.de (afgekort "PER") kan men gratis (Esperanto)advertenties plaatsen over alle mogelijke onderwerpen. De gebruiksaanwijzing staat onder "Kiel funkcias PER", boven aan het scherm.

Top 10 van kunstmatige talen

www.squidoo.com/top-10-man-made-languages presenteert een eigenzinnige top 10 van plantalen, gaande van Solresol over Esperanto tot Klingon. Merkwaardig is het wat ongewone Engels dat op de site gebruikt wordt. (Taalpost)

Nieuws

Als aanvulling op de in het vorige nummer vermelde nieuwssite novajhoj.weebly.com publiceert Maximiliano Catania dagelijkse nieuwsoverzichten op YouTube.
(www.youtube.com/user/mxcatania/feed?filter=2, Eventoj)

Por ekscii pliajn informojn pri jenaj eventoj, eblas ankaŭ telefoni al la Esperantocentro en Antverpeno, 03 234 34 00, aŭ viziti/skribi al Frankrijklei 140 2000 Antwerpen.

Certe rigardu la retpaĝon Eventoj.hu, la plej kompleta kalendaro en Esperantujo!

Podkasto.net

Retaj podkastoj de Varsovia Vento pri Esperantujo kaj la plej lastaj novaĵoj, aŭskultebla ĉe www.podkasto.net!

La Apotekan Ĝardenon

La 1an DE MAJO 2013 Ni invitas vin viziti "la Apotekan Ĝardenon" de la Hospitalo de la Virgina kun roso (nuna museo, hôpital Notre-Dame à la rose) en LESSINES.

En tiu regiono oni tradicie kultivis kuracplantojn. Tri ĝardenoj estas viziteblaj.

Tiu-ĉi foje ni elektos tiun de Lessines (50 km okcidente de BXL, 5' piede de la stacidomo).

13:30 en la akceptejo de la museo (place Alix de Rosoit) en Lessines.

14:00 vizito de la ĝardeno.

Poste por daŭrigi la plezuron, promenado laŭlonge de la rivero "Dendre" (sovagaj floroj videblaj) aŭ vizito individuale de la museo Hospital Notre-Dame à la rose (lasta eniro: 17h.45).

Gvidinformoj haveblaj en plurlingvoj. www.notredamealarose.com.

Pli da informoj?
ĉe Monique Van Roy (068/542728)
prefere frumatene
aŭ Catherine Royaux (010/451921)
cat.royaux@netcourrier.com (aliĝo dezirata)

Festu kongrese

90a Germana Esperanto-Kongreso,
17.-20.05.2013 kun festo de la 125-jariĝo de la Nurenberga Esperanto-Grupo

loko: Caritas-Pirckheimer-Haus,
Königstr. 64, 90403 Nürnberg

informoj kaj aliĝo:
www.esperanto-nuernberg.de/gek,
esperantonord@googlemail.com aŭ
Esperanto Nürnberg, Moritzbergstr. 37,
90482 Nürnberg, Germanio

Pli da informoj kaj aliĝilo ĉe
www.esperanto-nuernberg.de/gek aŭ

Esperanto Nürnberg, Moritzbergstr. 37,
90482 Nürnberg, Germanio.

Tagaj novaĵoj mallonge - kaj per voĉo kaj per teksto!

Kio estis la ĉefaj novaĵoj hodiaŭ en la mondo? - je tiu demando faras respondon Maximiliano Catania el Argentinio, redaktoro de novtipa jutuba novaĵservo!

Jam de pluraj monatoj li ĉiutage resumas en Esperanto la plej gravajn novaĵojn en 1,5 minuta aŭd-vida kompilaĵo per jutuba filmeto: oni vidas frapfilmeton (kiel en televidoj), aŭdas la novaĵojn (kiel en radioj), kaj sub la filmeto oni povas ankaŭ legi la voĉlegitajn tekstojn, kiu povas multe helpi la komencantojn.

Tiuj aŭdvidaj tagaj novaĵoj estas spekteblaj en propra kanalo de Youtube ĉe http://www.youtube.com/user/mxcatania/feed?filter=2

Maximiliano Catania produktis jam pli ol 100 novaĵ-registraĵojn, kiujn oni povas spekti laŭ diversaj enhav-kategorioj: eo-novaĵoj, sportaj novajoj, novaĵoj por Muzaiko, novaĵoj de BBC, ktp.

La kompilaĵoj estas aŭd-videblaj ne nur en la jutuba kanalo, sed ankaŭ en la novajportalo RTE ĉe http://novajhoj.weebly.com/ kaj ankaŭ en Muzaiko.

Muzaiko
Hejmo | Aŭskultu | Podkasto | Pri Muzaiko | Partneroj | Pro
Bonvenon al Muzaiko!
Muzaiko estas tuttempa tutmonda tutmojosa tutesperanta retradio-kanalo!

Tenzij anders vermeld zijn alle vergaderingen gratis en voor iedereen toegankelijk. Let wel dat de meeste activiteiten in het Esperanto plaats-vinden. Uiteraard zijn we steeds bereid geïnteresseerde bezoekers in het Nederlands te woord te staan.

ANTWERPEN – groep "Esperanto Antwerpen"

http://esperanto-antwerpen.weebly.com/

Alle programma's hebben plaats in het Esperantohuis, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, in het clublokaal op de eerste verdieping. De clubavond begint om 20.00 uur. Iedereen is welkom.

Elke vrijdagavond is er een bijeenkomst. Het programma zal tijdig verschijnen op volgende webstek: http://esperanto-antwerpen.weebly.com/

januaro 2013 januari

4/1/2013 Novjara regalo – Nieuwjaarsreceptie.

11/1/2013 Bart Demeyere: Prelego kun bildoj pri vojaĝo en Tanzanio – Voordracht met projectie over een reis naar Tanzanië.

18/01/2013 Jacques Schram: En la kadro de la Jaro pri Voĉlegado: Membroj laŭtlegas memelektitan tekston – In het kader van het Jaar van het Voorlezen: leden lezen een zelfgekozen tekst voor.

25/01/2013 Ĝenerala jarkunsido kun jarraportoj kaj honorigo de fidelaj membroj – Jaarvergadering: jaarraporten en viering van trouwe leden.

Februaro 2013 februari

1/2/2013 Malferma estrarkunsido – Open bestuursvergadering.

8/2/2013 Paul Peeraerts: Prelego kun bildoj: Dolcevento, aventura ferio en Toskanio – Voordracht met projectie: Dolcevento, een avontuurlijke reis in Toscanië.

15/02/2013 Jacques Schram: Prelego kun bildoj: Serĉante John Steinbeck; dek tagoj en Kalifornio – Voordracht met projecitie: op zoek naar John Steinbeck; 10 dagen in Kalifornië.

22/02/2013 Neven Kovačić: Prelego: Jugoslavio kaj post ĝi – Voordracht: Joegoslavië en er na.

BRUGGE – Paco kaj Justeco

Hou onze webstek www.esperanto-brugge.weebly.com in het oog voor de komende activiteiten of vraag meer informatie via: heidi.goes@gmail.com.

16 januari: lezing over Esperanto als inleiding tot de cursussen die de week erop starten. Vanaf 14u30 tot ongeveer 16u30. Plaats: cultureel centrum De Garve, Pannebekestraat 33, 8000 Sint-Jozef.

Cursussen (telkens 8 lessen):

- vanaf 23 januari bij Bart Demeyere thuis (Albert Dyseryncktstraat, 28, 8200 Brugge), telkens van 19h30 tot 21h30. Kosten: €20, incl. leerboekje.
- vanaf 25 januari, in De Garve, telkens van 9u tot 11u. Kosten: €30, incl. leerboekje

BRUSSEL – Esperantista Brusela Grupo

http://users.belgacom.net/EBG

Vergaderplaats: gebouw Van Maerlant, op de hoek van de gelijknamige straat en de Belliard-straat, tegenover het Leopoldpark, dicht bij metrostation Maalbeek.

Elke woensdag van 18.30u tot 20u. Aangezien dit gebouw tot de Europese Instellingen behoort, is er een vrij strenge controle. Bezoekers gelieven zich op voorhand aan te melden.

Contact: Françoise Pellegrin, e-mail: fransuaz – bij– esperantobruselo.org telefoon: 02 358 27 28

VLAAMS-BRABANT- Dilbeek.

In Dilbeek komt een groep Esperantisten maandelijks samen in het kader van "kennisbeurs Pajottenland". Ontmoetingscentrum Westrand, Kamerijkstraat z/n, 1700 Dilbeek, elke eerste zaterdag van de maand van 14 tot 16 uur.

KONVERSACIA RONDO en ESPERANTO

Ni kunvenos sabaton la 5a de januaro kaj la 2a de februaro 2013 en salono 301 (3a etaĝo) de la 14.00a ĝis la 16.00a horo. Se vi deziras, ni poste povas pluparoli kaj trinki ion en la kafejo en la sama centro. Kion ni faras? Ni rakontas pri niaj esperantaj kunvenoj, pri aliaj eventoj kiuj trafis aŭ amuzis nin, eble ni kantos kanonon de Kajto, kelkfoje ni legas poemon, solvas kruc-enigmon ...

Ĉu vi partoprenos ? Ne hezitu proponi kion vi ŝatus fari ! Ni kore invitas vin !

Se vi deziras pli da informoj telefonu al Lydia Buyst 054.33.01.51

GENT – La Progreso

http://www.esperanto.be/gent

Iedere 4de vrijdag van de maand clubvergadering in ons lokaal "La Progreso" Peter Benoitlaan 117 9050 Gentbrugge; aanvang: 20.00 uur. Inlichtingen bij Katja Lődör, tel. 09 230 16 77 of 09 221 10 02.

Vrijdag 25 januari: jaarvergadering, meer info volgt.

Vendredo la 25an de januaro: jarkunveno, pli da informo sekvos.

Februari 2013: "Librovespero", wie een interessant boek las en er met de leerlingen van de cursus over van gedachten wil wisselen, is steeds welkom.
Kiu legis interesan libron kaj volas priparoli ĝin kun la gelernantoj de la kurso estas bonvena.

KALMTHOUT – La Erikejo

http://users.telenet.be/La.Erikejo/Index.htm

La kunvenoj de la Erikejo okazos kiel kutime en la Parochiecentrum de Heide, inter la 20 – 22aj horoj.

Ĵaŭdo la 17-an de januaro 2013; je la 20-a horo. Jarraporto 2012; Financa raporto 2012; Gramatikaj ekcercoj.

KORTRIJK Koninklijke Esperantogroep La Konkordo

www.esperanto-kortrijk.info

Maandelijkse bijeenkomst in Erfgoedhuis zaal Lessius 1ste verd. O.L.Vrouwstraat 45, Kortrijk tel. 056/27 74 24. Elke vierde dinsdag van elke maand van 19u30 tot 21u30 niet tijdens juli en augustus. Indien de vierde dinsdag een feestdag is dan op de derde dinsdag.
Contact via mail piet.glorieux@gmail.com en esperantokortrijk@hotmail.com.

Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet:
Normaal zijn op elke eerste en derde donderdag van de maand vrijwilligers aanwezig in het Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet te Kortrijk.

LEUVEN - Esperanto 3000

http://www.esperanto.be/esperanto3000

01-09 Vespero 3000: Neformala babilado
Voordrachtavond: Informele gespreksavond
01-23 Daŭriga kurso Vervolgcursus
02-13 Vespero 3000: Grandaj nombroj
Voordrachtavond: Grote getallen
02-23 Aliaj programeroj: Lingva festivalo
Andere activiteiten: Talenfestival
02-27 Daŭriga kurso Vervolgcursus
03-13 Vespero 3000: Neformala babilado
Voordrachtavond: Informele gespreksavond
03-27 Daŭriga kurso Vervolgcursus
Cultureel Centrum Romaanse Poort, Brusselsestraat 63, 3000 Leuven
Kioman horon - hoe laat: ekde la 19:30a, prelego je la 20:00a

OOSTENDE – La Konko

Meer info: Marc Cuffez, voorzitter via 0486 362365 of marc.cuffez@telenet.be; Flory Witdoeckt, ondervoorzitter via 059 702914 of flory2@witdoeckt.be of http://www.lakonko.be

Lokaal: Albertschool, Ooststraat 29 te Oostende (tenzij anders vermeld)

- conversatienamiddag : elke maandag 14u30 - 16u30
- conversatieavond: op woensdagen 9 en 23 / 1 en 13 en 27 feb van 18u30 tot 20u
- bestuursvergadering: woensdag 30 januari om 18u30

PEER

Elke laatste donderdag van de maand van 20 u. tot 22 u. in Cultuurcentrum "'t Poorthuis", Zuidervest 2, 3990 Peer van september 2011 t/m juni 2012. Alle Esperanto-sprekers zijn van harte welkom !

TIENEN – La Hirundo

http://home.tiscali.be/lahirundo/

Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen.
Tel en fax: 016 / 81 52 46, bert.boon@skynet.be

Zaterdag 23 februari 2013

4de Talenfestival in Leuven

Ons Talenfestival stelt een groot aantal talen kort voor.

Je maakt kennis met typische kenmerken, uitspraak, evolutie en cultuur, grammatica en enkele basiswoorden van de taal. Je kiest vier talen uit een palet van vijftien tot twintig. Je krijgt ook een uitgebreid papieren overzicht. Enkele succestalen uit vorige edities worden herhaald, en er komen er weer andere bij.

Het thema voor 2013 wordt Toerisme. Met een tentoonstelling over toerisme, woordenboeken en leerboeken in vele talen.

Alle sprekers zijn moedertaalsprekers of kennen de voorgestelde taal grondig. De presentaties verlopen in het Nederlands. Op de affiche vind je al een lijst van de toegezegde talen. Sommige presentaties zijn specifiek voor kinderen en jongeren bedoeld, o.m. Spaans.

Er is ook een meer wetenschappelijke presentatie over "De toekenning van verantwoordelijkheid in verslagen over mensenrechten" in Chili, door Dr. Barbara De Cock en Dr. Daniel Michaud Maturana.

Het Talenfestival van Leuven is een organisatie van Esperanto 3000 vzw, Leuven. Het vindt plaats in **het Centrum voor Levende Talen, Dekenstraat 4 te Leuven vanaf 13.00u.**

De voorstellingen beginnen stipt om 13.30u, 14.45u, 16.00u en 17.15u.

Tussendoor is er gelegenheid voor een versnapering en een drankje.

Kies nu reeds je talen uit en reserveer je plaats op (niet verplicht, wel aangeraden):

www. talenfestival.be

De juiste plaats om een taaltje bij te steken !

ALGEMENE VERGADERING VLAAMSE ESPERANTOBOND V.Z.W.

Op 23 februari 2013, in Leuven,

voorafgaand aan het Talenfestival.

Om 10u tot max 13u, Centrum voor levende talen, Dekenstraat 4, Leuven

Agenda

1. leden Raad van beheer (administrantaro)
2. Goedkeuring verslag algemene vergadering september 2012
3. Verslag werkjaar 2012
4. Financieel verslag 2012
5. Verkiezing nieuw bestuur
6. Esperantocentrum
7. Toekomst - subsidies
8. Diverse

Kandidaturen voor het bestuur van de Vlaamse Esperantobond kunnen overgemaakt worden tot 20 februari naar prezidanto@fel.esperanto.be of bezorgd worden bij het begin van de AV te Leuven op 23 februari.

mvg, Marc Cuffez, voorzitter.



Contactadressen in Vlaanderen

ANTWERPEN *Esperanto-Antwerpen*, p/a Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00, E-post: esperanto-antwerpen@esperanto.be
BRUGGE *Paco kaj justeco*, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge, tel. (0)50 67 51 78 heidi.goes@gmail.com
BRUSSEL Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode, fransuaz@esperantobruselo.org, +32 2 358 27 28
Laurent Loisse, Tir-aux-Pigeons 95 1150 Bruxelles. tel. 02 770 11 71, sekretario@esperantobruselo.org
GENT *La Progreso* Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge, tel.: 09 230 16 77, gent@esperanto.be
KALMTHOUT *La Erikejo*, Mireille Smet-Storms, Dogulaslaan 14, 2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com
KORTRIJK *La Konkordo* P. Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201, 8610 Kortemark, tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com.
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk, tel.: 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com
LEUVEN *Esperanto 3000* Roger Goris, Rue Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille, tel.: 010 86 01 12, goris.r@skynet.be
LIMBURG *Limburgse Esperantovereniging* H. Schutters, Panhovenstraat 10, 3930 Peer, tel.: 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be.
LONDERZEEL Frederik Vanden Brande, Hof ter Winkelen, Holle Eikstraat 25, 1840 Londerzeel. Tel.: 052 30 01 66, fax: 052 30 53 65. comite.jean.pain@skynet.be
OOSTENDE *La Konko* Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65 (gsm), marc.cuffez@telenet.be
ROESELARE / TIELT zie KORTRIJK
TIENEN *La Hirundo* <http://www.lahirundo.be> Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen,Tel en fax: 016 / 81 52 46, post@lahirundo.be
TURNHOUT Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, 2300 Turnhout, tel.: 014 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be.

Contactadressen in Nederland

http://www.esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php
ALKMAAR Afdeling Alkmaar. Bert Klijn, Klipper 119, 1721 GW Broek op Langedijk, tel.: 0226-314183, esperanto.alkmaar@gmail.com
ALMELO G.C.A.M. Dercks, Molenstraat 20, 7607 AL Almelo. Tel. 0546 819403, gcamdercks@home.nl
AMSTERDAM Ans Bakker-ten Hagen Kastelenstraat 231-2, NL-1082 EG Amsterdam, tel.:+31(0)206 421 853, ten_hagen@concetps.nl
APELDOORN: Mevr. A. Schouten, Dintel 20, 733 MC Apeldoorn. Tel. 055 5332923, sampan@telfort.nl
BEVERWIJK *Stelrondo* R. Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, tel.: (0251)231079, r.moerbeek@kpnmail.nl
DEN HAAG *Internationaal Esperanto-Instituut (IEI)* Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, tel.: (070) 355 66 77.
DEN HELDER *Contact:* Vinus Lathouwers Kruiszwin 1205 NL-1188 LE Den Helder, tel.: +31(0)223 643 781, lj.lathouwers@quicknet.nl
DEVENTER zie ALMELO.
EINDHOVEN R. Bossong, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven, tel.: (040) 211 41 62, ru.bossong@planet.nl
ENSCHEDE Corrie Kwantes, Marnixstraat 57, 2023 RB Haarlem, Tel 023-5276561.
GOUDA Alfonso Pijnacker Postbus 778 NL-2800 AT Gouda, tel.:+31(0)651 376 257, a.pijnacker@xs4all.nl
GRONINGEN *Esperantocentrum*, T.W.S. Mansholtstraat 25, NL-9728 MC Groningen, tel.: (050) 527 45 72.
HAARLEM-HEEMSTEDE *Komprenado faras pacon* Corrie Kwantes, Marnixstraat 57, 2023 RB Haarlem, tel.: 023-52 76 561.
HEEMSKERK Joke Hoobroeckx Marquettelaan 33 NL-1964 JR Heemskerk, tel.:+31 (0)251 232 155, hbxd@freeler.nl
HELMOND Toine Gremmen, Nassaustraat 3, 5707 HL Helmond, tel.: (0492) 54 44 72, info@twangremmen.nl
LEIDSCHENDAM-VOORBURG: M.H. Erasmus-van Zadelhoff, Laan van Oostenburg 40, NL-2271 AP Voorburg, tel.: (070) 38635 29, marjet.erasmus@zonnet.nl
MIDDEN ZEELAND S.P. Smits, Deken Tomaslaan 32 NL-4453 AL 's-Heerenhoek, tel.: +31(0)113 351 456, spsmits@hotmail.com
NIJMEGEN Klubo "Zamenhof" Jan Bemelmans Turkooisstraat 43 NL-6534 WD Nijmegen, tel.: +31(0)243 882 926
OOST-VELUWE Anneke Schouten-Buys Dintel 20 NL-7333 MC Apeldoorn, sampan@tiscali.nl
ROTTERDAM *Merkurio* P. Schuil, Park Vossendijk 331, 3192 XG Hoogvliet, tel.: (010) 416 14 49.
TANEF/*La Migranto* Aad Demmendaal-o/d Brouw, Boekenrode 11, NL-3085 JA Rotterdam, tel.: (010)48 15 388
UTRECHT E.O. Ed Borsboom Noordweg 34 NL-3704 GN Zeist, ed.borsboom@versatel.nl
VOORBURG: zie Esperantogroep LEIDSCHENDAM-VOORBURG
ZEEUWS-VLAANDEREN: Det Koning, van Speykstraat 19, 4535 BN Terneuzen, tel.: 0115 694 670, det@digitalplaygrounds.com

Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra EsperantoLigo Frankrijklei, 140, B-2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00, Fax.: 03 233 54 33. Epost: info@fel.esperanto.be. Internet: www.esperanto.be
Vlaamse Esperanto Jongeren Vereniging / Flandra Esperanto Junulara Asocio p/a Frankrijklei 140, B2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00 Epost: fleja@esperanto.be.
ILEI-Belgio: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, marc.cuffez@telenet.be
Esperanto Scoutsvereniging/Skolta EsperantoLigo (SEL) Stein Hautekees, Rue des Rèches 20, B-5530 Yvoir, post@sel-belgio.be Zie ook: www.sel-belgio.be
Association pour l'Esperanto, p/a Marcel Delforge, rue des Glacières 16, B6001 Charleroi (Marcinelle). Tel.: + fax: 071 43 14 13. Epost: mardelforge@brutele.be.
Belga Esperanto Fervojista Asocio (Spoorwegesperantisten), Lucien De Sutter, Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende. Tel:059 50 18 25.
Esperanto Nederland, secretaris, p/a Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, T: 050-5718842, E: sekretario@esperanto-nederland.nl
Hoofdkantoor van de Esperanto WereldVereniging/Centra Oficejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL3015 BJ Rotterdam, tel.: 00 31 10 436 10 44. Epost: uea@inter.nl.net.

Bestuursleden van FEL

Voorzitter:	Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel 0486 362365, marc.cuffez@telenet.be
Ondervoorz.:	Flory Witdoeckt, Wapenplein 17/8, 8400 Oostende, tel. 059 702914, flory2@witdoeckt.be
Penningmeester:	Kevin De Laet, Muizenstraat 5/3, 2060 Antwerpen, kevin.de.laet@telenet.be
Secretaris:	Griet Symoens, Koningsstraat 9/5, 8400 Oostende, griet.symoens@esperanto.be, 28 sep 1944 Kalmthout
Bestuurslid:	Helena Van der Steen, Turnhoutsebaan 459/12, 2140 Borgerhout, h.vdsteen@scarlet.be
Bestuurslid:	Roland Rotsaert, Marie Popelinplantsoen 3/402, 8000 Brugge, roland.rotsaert@gmail.com
Bestuurslid:	Bart Demeyere, Albert Dyserynckstraat 28, 8200 Brugge, bart.demeyere@esperanto.be
Bestuurslid:	Walter van den Kieboom, Tulpenlaan 16, 8450 Bredene, tel 059 702914, flory@witdoeckt.be

ISSN-0772-540X afgiftekantoor Antwerpen X
Tweemaandelijks tijdschrift